TEA-BULTENO

12ª JARO | MAJO - JUNIO 2009 | NUMEROJ 5-6

Per kiso, vi ekscios ĉion, pri kio mi silentis.
Pablo Neruda (1904-1973)

Finfine!

Jam tri jaroj pasis ekde kiam triesta esperantistaro, tra tutaj dek du monatoj, festis, festadis la grandan eventon, la Jubileon de TEA. Diversajn aranĝojn oni organizis dum 2006: okazis serio de prelegoj pri lingvo kaj komunikado, solena Sankta Meso kun akompano de kantoj en esperanto, Internacia Renkontiĝo "Inter Karsto kaj Maro", ĝemeliĝo kun Rijeka-Asocio, "Kara Amiko, mi skribas al vi…", ekspozicio pri poŝtkartoj esperantaj ekde 1906 ĝis 2006, okaze de kiu estis eldonitaj eĉ du porokazaj stampoj. Enprogramita, kiel krono sur la tuta eventaro, estis ankaŭ eldono de ampleksa kronik-historia libro pri tiu centjara agado de loka samideanaro.

Sed la entrepreno, komencita en 2005, estis nek simpla nek facile realigebla. Plej probable oni ne sufiĉe funde taksis, kiom komplikaj kaj kiom temporabaj povas esti la priserĉado en arkivo kaj hemeroteko, la kontrolo ĉu informo estas korekta aŭ fantazia. Plie, multaj donitaĵoj foje estis malprecizaj: pri la sama argumento, tie aperis iu versio, tie ĉi iu tute alia. Foje oni estis malespera pri iama konkretiĝo de tiu, certe iom ambicia, projekto; foje, male, oni entuziasmiĝis pri novaj eltrovoj, pri neatendita helpo veninta eĉ el eksterlando!

Cent jaroj, se rigardataj el homa vidpunkto, estas multaj kaj la okazintaĵoj, dum tiu longa tempoperiodo, interpleksiĝas formante kvazaŭ araneaĵon malfacile malnodeblan, de tempo al tempo eĉ kaosiĝas. Okaze ilin oni rigardas kvazaŭ kreaĵoj de fantaziulo, ĉar ne plu estas vivaj la memoroj pri tiuj tro foraj momentoj. Post kiam—finfine!—ŝajnas ke ja ĉio estas kompleta, ke nenio plu aldonendas, kiam la skriba versio, en sia definitiva redakto, estas en la manoj de tiuj kiuj fordonis grandan parton de siaj tempo kaj energio, kiam do, kun granda spiro de senpeziĝo, oni kredas esti atinginta la celon en gloro, jen batoj sur kapojn! Tiam komenciĝas la plej turmentita suferperiodo: kritike, malsubjektive, senkompate poluradi la tekstaron. Kaj … alia jaro kaj duono forflugas tiele, preskaŭ tute ne rimarkita! Ĝis kiam, posttagmeze de la 15ª de aprilo 2009, ĉe la Antikva Kafejo Sta Marko, ĉeeste de kvindeko da personoj, fiere kaj orgojle "Cento anni di esperanto a Trieste" sin prezentas. Sed ne mia estu la tasko raporti pri la okazaĵo, volonte mi transdonas la parolon al profro Carlo Minnaja, kiu tiel, resume kaj iel telegrafe, priskribas la aranĝon en interreto:

Hastelkure, mi partoprenis en Triesto la prezentadon de la libro. Tre favore ĝi impresis min: parolis tre bone Edvige, la eldonisto kaj universitata prof-ino, bele gitarludis junulo, estis legita poeziaĵo esperante kaj itale. …. Dum la prezento venis ankaŭ ĵurnalistino … La historia kafejo, kiu gastigis la aranĝon, estis tre bela kaj taŭga por kulturaj renkontiĝoj (fakte da tiaj okazas ofte). …. Belaspektas la reklamafiŝeto.

Dum la trajna revenvojaĝo, mi relegis la libron (antaŭe mi jam estis leginta ties malneton). Ĝi estas ege valora dokumento pri la agado de la triesta esperanto-grupo, kun la celo ne nur disvastigi esperanton, sed partopreni ankaŭ en la loka kultura vivo laŭ internacia perspektivo. La kompostado laŭ mi ŝajnas tre bona, kun apendico de koloraj dokumentoj kaj sur la paĝoj, marĝene, klarigaj notoj….. La biografiaj notoj rilate al la ĉefroluloj de la loka esperantista vivo kaj la tre kompleta enhavtabelo estas tre bonaj helpiloj por ĉerpi nomojn kaj informojn, kiuj troviĝas en la libro.

La esperantistaj grupoj multon agadis, kaj oni devas plugardi la memoron en ĉi epoko kiu kuras for kaj malofte sin turnas malantaŭen por rigardi la pasintecon.

Mi scias, ke (Giacomino) Martinez jam finpreparis ion similan rilate al Friulo: Kiam estos aliaj historiaj celebradoj por aliaj regionoj?

Sincerajn gratulojn al Triesta Esperanto-Asocio por la jarcenta aktiveco kaj por la libro … konsistanta el pli ol 270 paĝoj.

Du gravaj eventoj en Triesto

De la 6ª ĝis la 10ª de majo, en la Salono *degli Incanti* (eksa Centra Fiŝbazaro) okazos manifestacio kun titolo "**KUNE EN TRIESTO**", Foiro de solidareco, organizita de la Asocio *Tutela Onlus*, kunlabore kun Komunumo de Triesto kaj ties sekcio "Grandaj Eventoj". Sin prezentos al publiko dum 5 tagoj, dudek kvin socialaj kaj kulturaj volontulservaj asocioj, kiuj per propagandiloj diverspecaj, libroj, kunvenoj, projekciado de dokumentaroj, koncertoj kaj teatraĵoj, diskonigos sian agadon kaj vaste informados pri propraj celoj, atingoj, esperoj. Tre variaj estas la agadkampoj de la diversaj ĉeestontaj asocioj: ekzemple, Asocio pri Diabeto, *Pro Senectute,* Triesta Alpista Klubo, Itala Ligo por lukto kontraŭ kancero, Muzika Lernejo, Radio *Fragola*, Regiona Kinoteko kaj, kompreneble, ankaŭ **TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO**! De la 8.30 ĝis la 21.30 triestaj esperantistoj alterne deĵoros ĉe tablo lokita en la Salono. Estos je dispono miloj da propagandiloj (donacitaj de FEI), libroj, gramatikoj kaj kio ajn alia bezonata por taŭga reklamado. Jam enprogramitaj, ĵaŭde la 7an (16.30 h), projekciado de bildoj pri: "Kio estas esperanto?"; vendrede la 8an (11ª h) prezento de IFEF-Kongreso, kaj posttagmeze, de la libro "100 anni di Esperanto a Trieste"; dimanĉe la 10an (11ª h) filmo "En Ĉinio per esperanto". Kunhelpantoj sin anoncu!

61ª IFEF-KONGRESO, 23-29 de majo; **POST-KONGRESO**: 30 majo-1 junio. Fervojistoj el 18 landoj festos la 100-jariĝon de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio per tre interesa programo dumtaga kaj vespera. Ĉiu-marde kaj -vendrede oni kunvenas en TEA-sidejo kaj sin preparas por akcepti la gastojn. Laboroj multegas, oni bezonas ĉies helpon: dumkongrese okazos ekskursoj, vizitoj, prelegoj, teatraĵoj, ĉiĉeronado tra la urbo ktp ktp. Ni kune laboru por igi plej sukcesan ankaŭ ĉi eventon!

MONDA MARŜADO POR PACO

Dum la venontaj monatoj de oktobro, novembro kaj decembro grava evento okazos tra la tuta terglobo: la <Monda Marŝado por Paco kaj Neperforto>, kiu per itinero 160.000 km-ojn longa, trairos 90 landojn de 5 kontinentoj.

Ĝin iniciatis la internacia organizo "Mondo Sen Militoj" kaj ĝis nun jam aliĝis gravaj organizoj, elstaraj homoj, Nobel-premiitoj, sennombraj lokaj asocioj kaj movadoj.

La marŝado, kiun Unuiĝintaj Nacioj rekonis kiel <Internacia Tago de Neperforto> ĉar naskiĝa datreveno de Ghandi, startos de *Auckland* en Nov-Zelando la 2an de oktobro 2009, kaj finiĝos la 2an de januaro 2010 ĉe la argentinaj Andoj, piede de la monto *Aconcagua*.

Dum tri longaj monatoj la marŝontoj spertos ĉiujn klimatojn, ĉiujn sezonojn: de varma somero en tropikaj kaj dezertaj landoj ĝis la frosta vintro en Siberio. La plej longaj etapoj trairos la tutajn Azion kaj Amerikon, ambaŭ longdaŭre de unu monato.

En ĉiuj urboj, kiujn la marŝantoj vizitos, renkontiĝoj, forumoj, festivaloj, koncertoj kaj sportaj, kulturaj, sociaj, artaj, edukaj eventoj estos organizataj fare de lokaj grupoj, laŭ propra iniciato. Ĉio ĉi celas kunigi pacemajn kaj bonvolemajn homojn por tutmonda konsciiĝo – samkiel iam okazis ĉe mediaj problemoj – pri tute nepra kondamno de ĉia perforto, por akiri veran pacon.

La marŝantoj, kiuj alvenos el Slovenio, haltos en Triesto dum la 7ª kaj la 8ª de novembro kaj jam nun pluraj asocioj estas planantaj indan gastadon.

Do, tiu ĉi marŝado trafas kunigi plurajn popolojn en pacema ĉeno, samkiel esperanto celas al kunigo per lingvo. Ambaŭ indaj celoj.

VIGLO



FILMO EN ESPERANTO

Animaciajn filmojn en Esperanto mi volas fari. Tiucele mi studas animacion ĉi-jare ĉe filma lernejo. Ĝuste nun mi volas montri al miaj samklasanoj (kaj instruistoj), ke ja ekzistas homoj tutmonde kiuj volas vidi novajn animaciaĵojn en Esperanto. Se vi subtenas mian revon, bonvolu sendi poŝtkarton al mi ĉe la jena adreso:

Simmon Keith Barney
1111 Pacific St, # 407
Vancouver, BC V6E 3X7 CANADA

Disvastigado de mia peto estas permesata.

LIBRO PRI ESPERANTO

Finfine aĉeteblas la libro kiu detale rakontas pri la historio de Esperanto en Triesto. En ĝi oni renkontos la plej eminentajn personojn kiuj per siaj sindediĉaj faroj ĵetis pionire la semojn de la IL-o en Triesto kaj ĉirkaŭa teritorio, kaj ankaŭ tiujn kiuj, dum la paso de la jaroj, strebis antaŭen porti, kiel eble plej brile kaj sukcese, la verdstelan torĉon: ekde 1906 ĝis 2006.

Lanĉoferto: 15,00 € inkluz. de sendokostoj

Por informoj: noredv@tiscalinet.it; testudo.ts@gmail.com; 040 350093; 339 2226936

28.08-03.09.09

La novan aspekton de la Itala Kongreso karakterizas la "Seminarioj", studunuoj pri specifa aspekto de Esperanto, kiuj daŭras ĉ. 20 studhorojn tra tri-kvar plenaj tagoj.

La "Seminarioj" de la Itala Kongreso okazas ekskluzive en la Internacia lingvo, kaj ili celas tutmondan partoprenantaron. Por Kasino estas invitataj Ĵak Le Puil, Ulrich Lins, Louis Zaleski Zamenhof k.a. Apud la "Seminarioj" okazas intensivaj kursoj de Esperanto, baza kaj por progresantoj, zorge de gravaj Esperanto-pedagogoj.

Krome enestas la programon organizaj kunvenoj kaj distraj aranĝoj kaj koncertoj de aparta intereso. Kaj oni ne forgesas la turisman parton: veni al la plej belaj urboj de Italujo kaj ne viziti ilin kaj iliajn ĉirkaŭaĵojn estus certe krimo: turismaj celoj estos la urbo Kasino, ĝia Monaĥejo en *Monte Cassino*, la malnova urbo *Caserta* kaj ĝia Reĝdomo.

Venu al la Itala Kongreso kaj ĝi kare restos en via koro kaj en viaj okuloj dum longaj jaroj...

Pliajn informojn vi ricevos rigardante la ttt-ejon:
italakongreso.esperantoitalia.it/

Ja el tio oni povas konkludi, ke estas pli ol mil kialoj por decidi kongresi en Kasino, sed ĉi sube legeblas pri la 1001-a motivo nepre ne maltrafi ĉi okazon!

La 76ª Itala Kongreso en Montecassino

Jen, ne nur laŭ tiu ĉi nomo "historie" konata al mi! Dume mia nomo jam troveblas inter la unuaj aliĝintoj! La kialon mi provos iom ekspliki.

Ekzakte antaŭ 65 jaroj okazis tie neimageblaj batalegoj, kiuj atingis en la dua mondmilito la 5-an rangon! Mi estis en la germana armeo, soldato montarana kaj tiam staciita sur montopinto de Abruzoj. Proksime videblis *Montecassino*! Neforgeseblaj scenejoj – aparte dum la noktaj atakoj! Pli kaj pli proksimiĝis la fronto kaj ni ricevis la ordonon dumnokte suben iri kaj esplori en proksima urbeto/ruinaĵo, ĝis kie la malamiko eventuale jam enpenetris. Lacaj pro la "rampado" de rokaj deklivoj, ni atingis en la matena krepusko la unuajn murojn – iamajn domojn. Venis la ordono krei pli vastan, larĝan fronton, atenteme eniri la urbeton, kun pretaj pafiloj por tuja pafo je ekvido de malamiko. Preteririnte longan muron, mi atingis angulon, kiun mi volis rapide ĉirkaŭi. Tiumomente mi ekvidis proksimiĝantan soldaton en supozeble bruna uniformo, kun pafilo en simila pozicio kiel mi. Kaj jen miraklo, nek li, nek mi ekpafis! En tiu distanco ne estus eble maltrafi unu la alian. Anstataŭe, ni ambaŭ retiriĝis. Iom ŝokita mi pritaksis la okazintaĵon – tamen mi ja devos diri kial mi reiris? Ja mi havis ordonon pafi! Kiel preteksti? Estis konate, ke mi estas iom noktoblinda kaj kial ne profiti tiun malavantaĝon? Bonŝance nia grupo tamen iom retiriĝis al pli sekura loko, por atendi kio okazos. Post nelonge eksplodadis grenadoj en tiu loko, tiel ke ankaŭ la restintaj muroj falegis. Iom kaŝe mi pridemandis, kiu taĉmento estas antaŭ ni, kaj oni respondis, ke pola.

Evidente ni dankas niajn vivojn unu al la alia! Ĉu vi, kara polo, ankoraŭ vivas? Dum miaj oftaj vojaĝoj al Pollando mi "iel dankeme" memoras vin! Ĉu iu partopreninta polo eble esperantiĝis, "internaciiĝis"? Kiel ajn, anoncu vin - aliĝu kaj same revenu al nove rekonstruita *Montecassino*!

Estas konate, ke bedaŭrinde falis 100 mil soldatoj! Ja ankaŭ mi jam estis kvazaŭ entombigita! Kaj jen apenaŭ imageblaj kaj prefere ne memorendaj travivaĵoj, kiuj min jarojn persekutis – ĉefe nokte! Vekiĝinta, mi estis feliĉa, ke ne en malvarma kruda tero, sed en varma mola lito mi kuŝis. Problema estis rea endormiĝo. Ja ne estis kiel nun, kiam post ĉiu problemeto oni "terapias" konforme.

Nur post mia reveno kaj dank' al mia aktiveco en diversaj funkcioj (*iom legebla en mia biografieto*) mi akiris "normalan" staton. Aŭtogenan trejnadon mi ankaŭ nun ĉeokaze praktikas. En mia biblioteko troviĝas i.a. verkoj pri psikologio ktp. La originan ideon skribi detalan biografion, mi devis forlasi, por ne refali en similan malhelan "truon". Anstataŭe subpremigu tiun "episodon" en viaj pensoj, avertis min eminenta psikologo! Mi obeis ties konsilojn kaj eĉ preterlasis planitan viziton! Nur nun – post pli ol 6 jardekoj – ĉio ĉi ŝajnas al mi okazinta kvazaŭ en alia vivo! Kiel mi nun vidos, "travivos" ĉion?

Ja regis daŭra batalado! "Malaperis" apudaj konataj kamaradoj. Kaose, ni estis pli kaj pli miksitaj grupoj. Por defendi *Montecassino* ni iam devis enfosiĝi sur la deklivoj proksime al la jam treege detruita monaĥejo! Duope ni devis prepari kaj okupi truojn strategie elektitajn. Mi estis kunigita kun germana kamarado. (Lin mi serĉis post la milito. El iama GDR tute ne venis respondo.)

Al la malamikaj armeoj devis esti konate, ke inter ni estis multaj karintianoj, ĉar laŭtparolile oni atentigis nin, ke dum 24 horoj "kovros" nin tiom da bomboj kaj grenadoj, ke la tuta Karintio ne valoras tiom! Neniam mi tute forgesos tiun – por ni eternan nokton, ĉar fine ni estis plene kovritaj tere, vere entombigitaj.

Kiel kristano mi preĝadis al Dio, tiel ke mia kunulo/ateisto fine enviis min. Vi havis iun por paroli, kiu eble savis nian vivon. Post ioma silentiĝo ni penege liberiĝis el nia "tombo"! La

→

Ĉu vi scias, kio estas La Gazeto?

LA GAZETO estas revuo mondkultura, sendependa, esperantisma.

MONDKULTURA signifas ke la revuo publikigas eseojn kaj artikolojn pri gravaj aspektoj de ĉiuj kulturoj naciaj, popolaj, etnaj, tribaj kaj homgrupaj.

SENDEPENDA signifas ke la Redaktaro publikigas en LA GAZETO tekstojn kaj grafikaĵojn, nur se ili estas kuntaŭgaj kun la principo de neŭtraleco, tio estas: nur se ili estas forme ĝentilaj kaj enhave tiel objektivaj kiel eblas en la homgrupo al kiu apartenas la aŭtoroj.

ESPERANTISMA signifas, ke la Redaktaro konsideras la esperantistaron kiel kulture aŭtonoma homgrupo.

Praktike: LA GAZETO estas 32- aŭ 36-paĝa, B5-formata revuo, aperanta ses-foje jare. La baza abonprezo estas 28 €, iom pli alta ekster Eŭropo, malpli alta en landoj ne facile pagipovaj (ekz.: 20 € en Hungario, 9 € en Bulgario). La revuo estas mendebla ĉe la peranto de LA GAZETO (en Italio: Elda Doerfler); en aliaj landoj petu rete ĉe gazeto@aol.com, aŭ skribu al la adreso de la revuo.

LA GAZETO ne estas redaktata por komencantoj, sed multaj bonaj esperanto-instruistoj ĝin uzadas pro la alta lingva kvalito de la publikigitaj tekstoj. Dum la lasta jaro, oni povis legi en LA GAZETO tekstojn de Detlev BLANKE, Ed BORSBOOM, Peter BROWNE, Christian DECLERCK, Kris LONG, Trevor STEELE, Nicolino ROSSI, YAMASAKI Seikô, MAO Zifu, Baldur RAGNARSSON, Antonio VALÉN, SHI Chengtai, Anatolo GONĈAROV, SEN RODIN, Dimitar HAGHIEV, KURISU Kei, HU Guozhu, David KELSO, Nikolao GUDSKOV, Gerrit BERVELING, André CHERPILLOD, Ĵak LE PUIL, Eugene DE ZILAH, Franz-Georg RÖSSLER ... kaj aliaj. Dum la sama periodo estis priparolitaj pli ol 35 libroj eldonitaj en la esperanta aŭ en aliaj kulturlingvoj. Ĉiu kajero enhavas ŝakproblemon de Algis KASPIRAVICIUS, krucvort-enigmon, kaj lingvajn ludojn de Nora CARAGEA.

La legantoj de LA GAZETO estas grandparte anoj de OSIEK (Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj) kaj estas en kontakto kun LA GAZETO kaj inter si.

LA GAZETO volonte sendas provnumeron al tiu kiu petas kaj donas sian precizan poŝtan adreson.

LA GAZETO, 12 sous la Ville
FR-55210 CREUË (Francio)
gazeto@aol.com http://www.lagazeto.com

INTERNACIA ESPERANTO-KONFERENCO
KONDOROS, HUNGARIO, 18-24 jul09

HUMURA LITERATURO EN ESPERANTO

Informoj, aliĝoj
Eric LAUBACHER, 1 rue Bougainville,
(FR) 78180 MONTIGNY-BX, Francio
tel. + 33 1 30 96 67 91
rete: kasisto@osiek.org
Pál KOZSUCH, Vasút u. 3,
(HU) 5553 KONDOROS, Hungario
rete: pauljuno@freemail.hu
OSIEK: http://osiek.org

Letero al la mastro Vespere, post la laboro, foriris kune la sekretario kaj la kasisto. **Sekretario**: "Jam tedis min nia estro. Dum 20 jaroj mi servas lin, suferante de lia malbonkoreco, sed ĝis nun mi nenion diris al li. Mi ĉiam retenis min. Sed hodiaŭ mi perdis la paciencon kaj skribis al li leteron." **Kasisto**: "Kion vi skribis en ĝi?" **S.**: "Mi skribis ĉion! Mi skribis, ke li estas terura homo, tirano, malbonkonduta. Mi skribis, ke ĉiuj laboristoj malamas lin. Mi libere verŝis mian koleron sur lin." **K.**: "Stultulo vi! Kion vi faris? Hodiaŭ vi skribis al li kaj morgaŭ li maldungos vin!" **S.** (timigita): "Kial li maldungos min?" **K.**: "Li maldungos vin tuj post kiam li legos tion, kion vi skribis pri li." **S.**: "Kion signifas «kiam li legos tion, kion vi skribis pri li»? Kiumaniere mia letero atingos lin?" **K.** (mirigite): "Ĉu vi ne diris ke vi skribis al li leteron?" **S.** (kvietiĝinte): "Certe mi skribis, sed ĉu mi diris ke mi sendis ĝin?"

bomboj kaj grenadoj "perfekte kovris" la tutan regionon! Evidente ni restis solaj kaj nur trance ni ekmoviĝis kaj iel trovis aliĝon al nia armeo, kie oni eĉ suspektis nin spionoj, venantaj de la alia flanko. Neniu kredis, ke ni rampis vivantaj el la tero! Emocie mi malfermis mian vestaĵon (kiun mi prefere ne priskribu) kaj demandis "ĉu tiel ni revenus de la alia flanko"? Post purigo kaj en ŝanĝitaj uniformoj oni volis nin subite prezenti herooj, kio nin fine jam ne plu logis! Sekvis retiriĝo, forlaso de *Montecassino*, de la germana armeo kaj per tio mi limigu mian raporton. La milito furiozis – por mi ĝis proksime al *Rimini*, kie nian unuiĝon privenkis la brita armeo. Vundita mi spertis alispecajn tragediojn en provizoraj lazaretoj – kaj fine prizonojn en Afriko! Sekvus aparta ĉapitro!

Hejme varbadis min t.n. kamaradecaj asocioj de revenintaj soldatoj, por vivteni la memorojn. Sed miaj reagoj estis tiel klaraj, ke fine oni ne plu demandis min! Laŭ tiu ĉi raporto ĉiu povas imagi miajn motivojn! Ne estas miraklo, ke mi "internaciiĝis" – fine aktive per esperanto!

Martin Stuppnig >mastuppnig@gmx.at<

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo: Via Coroneo 15 - Trieste - marde-vendrede 19-21 horoj
tel/fakso: (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscalinet.it
Grupa ttt-ejo://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina
Poŝta adreso: CP 601 Trieste Centro IT-34132 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349